

Sébastien Moret

Université de Lausanne, Svislando / Switzerland

Recenzo de la libro

Collinson, W.E. (2019). *La homa lingvo / Human language*. A. Tellier & W. Jansen (Red.). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

En 1927 la lingvisto kaj esperantisto William E. Collinson (1889-1969), profesoro pri germana lingvo kaj kompara lingvistiko en la Universitato de Liverpoolo, publikigis esperantlingvan libron kun titolo *La homa lingvo*. Temas pri “la unua enkonduko en lingvosciencan ĝis nun aperinta en Esperanto” (p. 28). Tiu libro estis reeldonita en 2019 fare de Angela Tellier kaj Wim Jansen, kun anglalingva traduko, dulingva (angla kaj esperanto) prezentado, dulingva personindekso kaj dulingva notaro. La anglalingvan tradukon faris Simon Davies. Kees Hengeveld, profesoro pri teoria lingvistiko en Amsterdamo, skribis la *Foreword / Antaŭparolo[n]*.

La notaro proponas plurajn tipojn de notoj. Oni trovas notojn, kiuj korektas aŭ komentas la Esperanton de Collinson. Aliaj notoj komentas la enhavon el lingvosciencia aŭ historia vidpunkto, kun la celo “gvidi la modernan leganton tra la lingvosciencia kampo de la jaroj 1920” (p. 11). Notindas, ke la esperantlingva “Notaro” kaj la anglalingva “Notes” ne tute similas: kiel skribas Angela Tellier, “[ĉ]iu estas skribita kun sia respektiva lingvo en menso.” (p. 11).

La biografio de Collinson estas kelkpaĝa, sed enhavas la ĉefajn informojn pri la privata, scienca kaj esperantista vivo de la aŭtoro. Mankas laŭ mi listo de la sciencaj verkoj de Collinson, kiu montrintus liajn sciencajn interesojn kaj esplordirektojn. Angela Tellier skribas ke “[d]um sia longa kariero, Collinson publikigis multajn artikolojn, ĉefe prilingvaj, kaj plurajn librojn” (p. 21), sed ŝi mencias nur lian doktoriĝan tezon (Collinson 1915), lian (kun Hanna Connell) dudirektan germanan-anglan vortaron (Collinson kaj Connell 1954), kaj libron (kun Robert Priebisch) pri *La germana lingvo* (Priebisch kaj Collinson 1934). Menciindus lia broŝureto “Esperanto kaj ĝiaj kritikoj”, kiu aperis franc-, german-, kaj anglalingve en la komenco de la 1920-aj jaroj (vidu ekzemple Collinson 1924).

Por verki sian libron, Collinson apogis sin sur pluraj aŭtoroj kaj libroj. Kelkaj el ili aperas en la bibliografio (p. 200-201), sed la plimulto ne: la

plimulto de la aŭtoroj, kies verkojn Collinson legis kaj uzis, aperas nur en la teksto de la verko, plej ofte nur kun sia familia nomo kaj sen iu referenco al iu verko. Plue, li citas ne nur famajn aŭtorojn kaj sciencistojn, sed ankaŭ malkonatajn aŭ forgesitajn aŭtorojn, kaj ne nur lingvistojn. En tiuj kondiĉoj la dulingva “Personindekso” (p. 202-221) tute utilas donante informojn pri la cititaj aŭtoroj, ties verkoj, ideoj aŭ fakintereso. Tiu (granda) laboro de la redaktintoj ebligas rekonstrui la libron de Collinson.

Sendube, el la vidpunkto de Esperanto kiel lingvo, la aperigo en 1927 de la libro de Collinson estis grava evento. Kiel Collinson mem diris, li verkis “la unuan enkondukon en lingvosciencan ĝis nun aperintan en Esperanto” (p. 28). Verkinte tiun libron pri lingvoscienco (kiu tiutempe estis grava scienco), li helpis plilarĝigi la sciencajn kampojn, en kiuj Esperanto estis uzata, kaj pruvis, ankoraŭ plian fojon, ke Esperanto estis lingvo tute taŭga por la sciencoj. Plie, klaras ke la libro de Collinson kontribuis al la evolua kaj riĉiga procezo de la lingvo. Por verki libron pri lingvoscienco, oni bezonas apartan, lingvosciencan vortprovizon, kiujn Collinson devis pripensi kaj forĝi; li devis ankaŭ adapti la lingvon al nova scienca kampo:

Dum la ellaborado mi konstatis, ke la internacia lingvo en sia nuna stado prezentas grandajn stilajn avantaĝojn kaj – ni estu sincera – ankaŭ kelkajn malfacilaĵojn al tiu, kiu pritraktas sciencan temon. Netakseble aprobinda estas la libereco, kiun ni ĝuas en la vortkombinado kaj derivado – sed kelkfoje mi iomete bedaŭris la mankon de pli delikate nuancigitaj sinonimoj, kiuj permesus la eviton de kelkaj ĝenantaj ripetadoj. Tamen, ni ne plendu, sed klopodu evoluigi la teknikajn vortarojn (p. 26).

Tiun lingvan aspekton de la libro de Collinsons prave substrekiis Wim Jansen. Danke al la prilingvaj notoj la leganto, precipe “ĉiu, kiu interesiĝas pri la lingva evoluo de Esperanto tra preskaŭ tuta jarcento”, atentiĝas “pri ortografiaj detaloj, kiuj devias de la nuntempa uzo, pri arkaismoj kaj neologismoj, pri la influo de la tiama socio sur la lingvouzon de Collinson”, “pri gramatikaj apartaĵoj” (p. 12).

Nun, kion diri pri la recenzita libro el la vidpunkto de ĝia enhavo¹ kaj de la lingvoscienco? Collinson planis verki “elementa[n] enkonduko[n] en la ĝeneralan lingvistikon” (p. 30-32). Kun tiu celo, li enskribiĝas en la (lingvo) sciencan aeron de la tempo. Ekde la komenco de la 19-a jarcento kaj el la evoluo de la historia kaj kompara lingvistiko, ekfloris la unua scienca, institucia lingvoscienco, kiu celis la analizadon kaj la ordigon de faktoj rilate

1 La redaktintoj prave atentigas pri la fakto, ke kelkparte en sia verko Collinson estas “filo de sia tempo” (p. 224). Tra la paĝoj aperas skribaĵoj kiel “kulturnacianoj” (p. 40), “la plej sovaĝa kaj senkultura homa lingvo” (p. 108), aŭ “la primitivuloj” kaj “la sovaĝulo” (p. 136). Tiuj terminoj estis tiam licaj (eĉ eble kutimaj), kaj spegulas alian epokon. Ilin oni devas rimarki, sed ilin oni ne devas konsideri por juĝi lingvosciencan libron.

al apartaj lingvoj aŭ apartaj lingvofamilioj. Tamen, tuj poste aperis la bezono, en la fino de la 19-a jarcento kaj en la komenco de la 20-a jarcento, de iu ĝenerala scienco, kiu irus preter la apartaj lingvoj kaj la apartaj priskriboj kaj kiu koncernus ĉiujn lingvojn (pri tiu aspiro, vidu Normand kaj aliaj 1978). Kelkaj famaj nomoj kaj titoloj spegulas tiun aspiro: Ferdinand de Saussure (*Cours de linguistique générale*, Saussure 1916), Edward Sapir (*Language*, Sapir 1921), Otto Jespersen (*Language*, Jespersen 1922), Joseph Vendryes (*Le langage*, Vendryes 1921), inter aliaj. Notindas, ke ĉiuj el tiuj aŭtoroj aperas en la bibliografio de *La homa lingvo*, kaj ankaŭ en la teksto, tiel montrante ke Collinson ja uzis ilin. Kun sia “volumeto pri la homa lingvo” (p. 26) por esperantistoj, Collinson povas esti aldonita iel al tiu listo kaj al tiu aspiro al ĝenerala prezentado de homlingva fenomeno.

En sia verko, Collinson traktas la sekvontajn problemojn: “1. La naturo de la lingvo”, “2. Skizo de fonetiko”, “3. La bestaj krioj”, “4. La infana lingvo”, “5. Lingvaj ŝanĝoj”, “6. Disiĝo kaj unuiĝo”, “7. Fremdaj influoj”, “8. Lingvo kiel karakterizilo de la parolantoj”, “9. La klasifiko de la lingvoj”. Tiujn ĉapitrojn antaŭas kaj sekvas “Antaŭparolo” kaj “Postparolo”.

Kiel Collinson skribas, por “desegn[i]” sian “sintezo[n]”, li legis “tuta[n] aro[n] da esploristoj” (p. 26). Kun kia rezulto? Pri sia “vagado” (p. 196) tra la lingvoscienco, li diras, ke “[e]n kelkaj partoj ĝi sendube aspektas kiel mozaika pavimo”, ke eble “ĝi estas kruda kaj kelkloke ne montras klarajn konturojn” (p. 26). Oni povas konsenti kun tiu aserto, la verko de Collinson iomete aspektas enhave malegala kaj kelkfoje kvalite ne ĉiam elstara. Sekve, leginte lian “verketon” (p. 26), la impresoj varias. Estas partoj interesaj. Ekzemple, li starigas la demandon “[ĉ]u oni rajtas taksi la mensan perspektivon de iu popolo laŭ ĝia lingvo?” (p. 172) kaj atentigas “pri la danĝero formuli tro vastajn ĝeneraligojn el kolekto da lingvaj fenomenoj” (p. 174). Estas ankaŭ partoj, kiuj spegulas la tiutempe novajn rezultojn en lingvoscienco: en la ĉapitro “Disiĝo kaj unuiĝo”, Collinson malkonstruas la nocion de *dialekto* (p. 153-154). Tamen, enestas eraroj: en lia grupigo de la slavaj lingvoj, li prezentas grandan “sudorienta[n] subgrupo[n]” (p. 190), kiam kutime oni distingas inter la orienta kaj suda subgrupoj (tio estis la fakto jam en 1927). Indas noti ankaŭ mankoj: kiel rimarkas Hengeveld (p. 7), estas ĉapitro pri fonetiko, sed ne pri morfologio aŭ sintakso; kaj en sia prezentado de la hindeŭropa lingvofamilio (p. 190-192), Collinson forgesis la anatolian branĉon, nome la lingvojn de Malgranda Azio, kiuj estis malkovritaj en la jaroj 1910, kiel la hitita). Fine, estas troaj simpligoj, ekzemple kiam Collinson skribas (p. 176): “Nun ni aldonu al la radiko *bak* la silabon *ist*”.

La homa lingvo povintus havi interesan flankon, ligitan kun Esperanto. Jansen notas, ke “Collinson fiere kalkulis Esperanton al tiuj (nature) homaj lingvoj, kaj ne hezitis tiri ekzemplojn el Esperanto por ilustrati certajn feno-

menojn” (p. 13). Estas prave, sed oni povas bedaŭri, ke la ekzemploj el Esperanto estas malmultaj kaj iomete supraĵaj. Ekzemploj el Esperanto (vidu p. 50, 84, 176-178, 184) sendube utilas en lingvosciencia enkonduko farita por esperantistoj, sed Esperanto povintus esti uzata pli regule kaj rilate kun aliaj temoj. La redaktintoj prave rimarkigas, ke “[m]algraŭ tio, ke Esperanto pase menciigās en tiu ĉi ĉapitro [pri la lingvaj ŝanĝoj], la demando restas: kie staras Esperanto laŭ struktura aŭ tipologia vidpunkto?” (p. 239). Ankaŭ notindas ke, en sia “Postparolo”, Collinson proponas “aldoni kelkajn observetojn pri la graveco de lingvo kiel Esperanto por la lingvoscienco” (p. 196). Tiu estas tre interesa propono, kiu meritis esplorojn ankaŭ nuntempe. Sed la respondoj de Collinson estas rapidaj kaj fragmentaj. Temas nur pri listo de “studindaj demandoj” (p. 198), kiu apenaŭ montras, ke Esperanto tute gravas por studi la “ĉefproblemoj[n] de la ĝenerala lingvistiko” (p. 196).

Collinson celis verki enkondukon en la ĝeneralan lingvistikon por esperantistoj. Tiucele li legis aliajn, jam ekzistantajn enkondukojn en lingvistikon kaj fakajn librojn, kaj kompilis diversajn informojn. Lia *Homa lingvo* tute ne estas do “originala”, kiel li mem konfesis (p. 26).

Tiusence, iomete ĝenaj estas kelkaj el la vortoj de la prezentado, kiu akompanas la reeldonitan libron: “libro tiel rimarkinda” (p. 7), “ĝemeto” (p. 9), “Aplaŭdinda estas la iniciato de la redaktoroj” (p. 9). Tio aspektas iomete kiel senkondiĉa celebrado esperantista. La redaktintoj kaj la tradukinto certe faris grandegan laboron. Sed aperas ankaŭ la demando pri la utilo reeldoni kaj traduki *La homan lingvon*. Ĉu “la moderna leganto” (p. 11) kaj la nuntempaj lingvistoj bezonis tradukon de la libro de Collinson?

Ĉio, kio estis skribita en Esperanto, estas parto de la lingvo, parto de la historio de la lingvo, de ties evoluo kaj riĉigo. Tie kuŝas la valoro de la libro de Collinson: ĝi estas la unua enkonduko en la lingvosciencan skribitan en Esperanto. Sekve, ĝi ankaŭ estas parto de la historio de lingvoscienco. Tiel ni rigardu la verkon *La homa lingvo*.

Bibliografio

- Collinson, W.E. (1915). *Die Katharinenlegende: Der HS. II, 143, der Kgl. Bibliothek zu Brüssel*. Heidelberg: Carl Winters Universitätsbuchhandlung.
- Collinson, W.E. (1924). *Esperanto und seine Kritiker*. Berlin: Ellersiek & Borel.
- Collinson, W.E., Connell, H. (1954). *An English-German, German-English dictionary*. London: Penguin Books.
- Jespersen, O. (1922). *Language: Its nature, development, and origin*. New York: Henry Holt & Company.
- Normand, C., kunlabore kun Caussat, P., Chiss, J-L., Médina, J. (1978). *Avant Saussure: Choix de textes (1875-1924)*. Bruxelles: Éditions Complexe.

- Priebisch, R., Collinson, W.E. (1934). *The German language*. London: Faber & Faber.
- Sapir, E. (1921). *Language: An introduction to the study of speech*. New York: Harcourt, Brace and Company.
- Saussure, F. de (1916). *Cours de linguistique générale*. Lausanne / Paris: Librairie Payot et Cie.
- Vendryes, J. (1921). *Le langage: Introduction linguistique à l'histoire*. Paris: La Renaissance du Livre.

Pri la aŭtoro

Sébastien Moret (PhD) studis historion, slavistikon kaj interlingvistikon. Liaj verkoj pritraktas la historion de lingvistiko, interlingvistikon kaj esperantologion, samkiel la historion de slavistiko. Post postdoktoriĝa restado (2015-2016) ĉe la Departamento de Semiotiko de la Universitato de Tartu (Estonio), li nuntempe instruas en la Universitato de Laŭzano.

sebastien.moret@unil.ch

About the author

Sébastien Moret (PhD) studied history, slavistics and interlinguistics. His work focuses on the history of linguistics, interlinguistics and Esperanto studies, as well as the history of slavistics. After a postdoctoral position (2015-2016) at the Department of Semiotics of the University of Tartu (Estonia), he currently works at the University of Lausanne.

Sur l'auteur

Sébastien Moret (PhD) a étudié l'histoire, la slavistique et l'interlinguistique. Ses travaux portent sur l'histoire de la linguistique, l'interlinguistique et l'espérantologie, et l'histoire de la slavistique. Après un post-doctorat (2015-2016) au Département de Sémiotique de l'Université de Tartu (Estonie), il enseigne actuellement à l'Université de Lausanne.